DUA JARO. — No 18. Unu Numero : 10 CENTIMOJ. DIMANĈO 11 FEBRUARO 1906.

★ ESPERANTO ★

PROPAGANDA ĴURNALO POR LA LINGVO HELPA INTERNACIA

DE L. L. ZAMENHOF

ADMINISTRADO
Franca Eldono : Sº P. BERTHELOT, CÉRET, 4, P.-O. Francolando.
Bulgara Eldono : Sº N. D. KOVAĈEV, 40, Karavelov, SOFIA, Bulgarlando.
Por abonoj, vidu sur la alia flanko.
Nenian redaktajon sendu al la administrantoj.

REDAKTADO INTERNACIA
Sº Ch. LAMBERT
10, str. Berbisey, DIJON (Côte-d'Or), Francolando.
Por nacia redaktado, vidu sur l'alia flanko.
Nenian administrajon sendu al la Redaktejo.

REKLAMO-ANONCOJ
Agento Ĝenerala : Sº EMILE GASSE
59, Phalsbourg, LE HAVRE (Seine-Inférieure).
Prezo de anoncado sur internacia flanko :
Ĉiu centonmetro kolona : 2 fkoj.
Rabato 25 0/0 por 12 empresoj ; 33 0/0 por 24.
Minimumo 3 frankoj.

PRI ESPERANTISMO EN ANGLUJO

Esperanto estas antaŭeniranta malrapide sed kun certaj paŝoj. La « London Esperanto Club » (Esperantista Klubo de Londono) havis sian trian jaran kunvenon en *St. Bride's Institute* la 22an de januaro vespere. En ĝi preskaŭ ĉio estis priparolita esperante. La novajoj estis legataj en esperanto ; paroladoj kaj voĉdonoj pri dankado okazis esperante ; oni legis esperantan leteron de la prezidanto kiu bedaŭris ke li devis foresti ; post tio estis koncerto en esperanto ; resume : amuza kaj instrua vesperkunveno kiu finis per esperanta « God save the king » (nacia himno de l'Angloj).

Unu el la malmultaj paroladoj, kiuj estis faritaj angle, estis tiu de S-ro W. T. Stead, hon. kasisto, kiu sidis en la prezidanta sidilo pro la foresto de S-ro Felix Moscheles. Li diris tion ĉi :

Tiu eraras, kiu supozas ke l'angla lingvo fariĝas la superanta parolilo en la mondo. Memorigante pri sia freŝa vojaĝo en Rusujon, li trovis ke en Saratov kaj en Moskovo la homoj parolantaj esperante estas pli multaj ol tiuj kiuj parolas angle, kaj ke en kelkaj komercaj centroj estas pli uzata en skribado ol anglo. Nur kun grandega malfacileco li sukcesis kompreniĝi en anglo sur la kontinento, dum ke, se li estus parolinta esperante, multaj obstakloj kontraŭ sociaj rilatoj estus formetitaj. Li mem havas ĝis nun nur neprofundan konon de l' lingvo, sed li promesis al si mem ke li majstros ĝin por la venonta kongreso. 'Car nun liberala regnestraro venis en la potencon, estas ebla ke mono estas donata por la instruo de la lingvo.

D-ro J. C. O'Connor, vic-prezidanto, kiu enkondukis esperanton en Londono, mirigis la ĉeestantojn anoncante ke estas *sep membroj de la nuna angla regnestraro, enhavante la ĉefojn de l' fako edukada, kiuj favoras esperanton*, kaj Sir Edwin Cornwall, prezidanto de L.C.C., estas preta por stari advokato pri esperanto, aŭ pri simila internacia lingvo en sia projekto por kongreso de ĉefurboj.

La esperanta koncerto sekvis kun granda sukceso. Unu ĥoro de gesinjoroj venis sur la scenejon kaj, komencante per la kanto de l' Ligo, gajnis ĝeneralajn aplaŭdojn pro kantado de sentimentalaj kaj humoraj muzikajoj. Pli ol unu foje oni kriis « bis ! ». S-ro D. H. Lambert deklamis serĉan verkajeton, en kiu li montris kiel ridindaj sin faras la francoj provante paroli angle, kaj kiel tiu absurdajo estas formetita per esperanto.

Parton de la programo plenumis S-no Reeve kantante en esperanto la nun popularan kanton « I can't think of nuthin else but you, Lu, Lu », kies ĥora parto estas :

Mi pensas pri neniu krom vi, Lu, Lu
Ho kara Lu, ho bela Lu.
Matene post dormante
Mi vekiĝas ploregante.
La kaŭzo estas Lu,
La tutsola kaŭzo estas Lu, Lu, Lu.

La tuta ĉeestantaro, en fino de l' koncerto, kantis *Al la Reĝo*, kiu estas la angla nacia himno de l'esperantistoj. G'i komencas jene :

Vivu la reĝ' al ni,
Tre longe vivu li !
Gardu lin Di' !
Justa kaj pia reĝ' !
Dio, pro nia preĝ',
Estu kun li.

Tio estis kantata sur la tono de l' *God Save the king.*

* * *

La supra citato venas el la angla ĵurnalo *The Daily News*, numero de 23 januaro.

Jen nun kio estas legita en *The Norwood Press*, numero de 27 januaro.

Premio da unu guineo (1)

proponita al la legantoj de l' *Norwood Press.*

Intencante doni al niaj legantoj konstati ke esperanto povas esti legita kaj komprenita per sola rimedo de l' Esperantaj 'Slosiloj, ni presas sube facilan specimenon de esperanto, kaj ni proponas premion da unu guineo

por la plej bona traduko en anglo de iu

a) kiu ne havis antaŭan scion de esperanto, kaj

b) kiu prenis helpon nur de l' Esperanta Ŝlosilo, kiun oni povas aĉeti ĉe la *Norwood Press* kaj kiu kostas kvin centimojn.

La tradukoj devas esti subskribitaj nur pseŭdonime kaj alveni antaŭ aŭ je la unua poŝtkuriero la mardon 6 februaro, kun adreso « Esperanto, Press Office, West Norwood, S.E. » La sama koverto devas enhavi, sed sur aparta folio de papero :

1 — La pseŭdonimon,

2 — La nomon kaj adreson de l' konkursanto,

3 — Subskribitan deklaracion ke la du kondiĉoj (a kaj b) estis lojale plenumitaj ; kaj

4 — Ekzempleron de l' esperanta specimeno, detranĉitan for la Norwood Press, kaj gluitan sur la paperfolio.

La oficejo de l' ĵurnalo konservos la apartajn foliojn enhavantajn la nomojn de l' konkursantoj k.t.p., kaj sendos la tradukojn, subskribitajn per pseŭdonimo, al la *Bristish Esperantist Association*, kiu decidos pri la gajnanto de l' premio, kaj kies decido estos fina. Ni publikiĝos en nia numero de l' 17 februaro nomon kaj adreson de l' gajnanto kaj la tradukon gajnanta. Se estas multaj konkursantoj, oni donos ankaŭ konsolajn premiojn.

Jeno estas tradukota :

En la teatro. — Dum la prezentado de ia teatra ludo, diris sinjoro al sia najbaro :

— Kiel malbela estas tiu ludantino !
— Tiu estas mia edzino, li respondis.
— Vi malkomprenis, Sinjoro ! Mi ne aludis al tiu sinjorino kun la nobla kaj gracia sintenado, sed mi celas la junan ostan malbelulinon kun la akra nazo.
— Estas mia filino, Sinjoro.

Aŭdu junuloj kaj maljunuloj !
Provu kaj gajnu la guineon !

Kun la ŝlosilo, ni baldaŭ kapablos traduki esperanton en bona anglo.

* * *

Tiu diverseco de propagandaj rimedoj, kaj la graveco de ilia signifo, montras al ni la fervoron de niaj anglaj samideanoj kaj promesas, ke ili baldaŭ plenumos ilian profetajon en la Kongreso de Bulonjo : « Ni komencis la lastaj, sed ni baldaŭ estos la unuaj ! »

Kaj efektive, oni povas pensi ke, se Angloj decide metas je la propagando de Esperanto la apartajn kvalitojn de metodemo kaj persisteco karakterizajn de ilia raso, la sukceso de nia afero estas de nun baldaŭ certigebla.

K. L.

(1) Unu guineo valoras frankojn 26,20.

DIVERSAĴOJ

Al la Grupoj

En speciala cirkulero sendata al la prezidantoj de la francaj grupoj filioj de S.f.p.E la estraro de tiu societo sin skandaliĝas pri la formo — vere iom nesingardema — de la avizo en kiu nia Administranto petis informojn de la franc=, belg= kaj svis=landaj grupoj por la bezonoj de sia propagando. La plej multo el la kelkaj grupoj, kiuj ĥam ne jam respondis, tre bone prenis la aferon. Ekzemple, la juna nova grupo de *Noyers Saint-Martins*, tuj skribis al ni :

« Nia novnaskita, sed tre vivema grupo, nepre ne volas iri en vian teruran tombejon. Ni do rapidas.... »

Kaj ĝi bone faris, ĉar ni intencis nek konduti tirane nek piedmarŝi sur la rajtoj de iu ajn, sed nur veki la prokrastantojn, sen ilin iel ajn ofendi.

Tamen, oni permesos ke la Administranto respondu kial li, kontraŭ la konsilo kiun donas al li la S.f p.E , prenis siajn informojn senpere, anstataŭ sin konfide turni al ĝi. Tio estas simple pro jenaj tialoj :

1e La grupoj filioj de S.f.p.E., estante plene liberaj — almenaŭ ni kredas — pri sia agado, tute rajtas korespondi *senpere* kun Esperanto-ĵurnalo

2e Esperanto-ĵurnalo estas nek pro nek kontraŭ, sed ekster S.f p E. ; ĉar ĝi faris por sia propra propagando, sian enketon pri la franclingvaj grupoj, kaj ne pri S.f.p.E., estis tute natura ke ĝi sin turnis al tiuj grupoj mem, kies cetere duono apenaŭ apartenas al la nomita Societo.

Kiel oni la historion skribas

Oni memoras, ke itala ĵurnalisto rakontis la kreadon de Esperanto dum 20-jara mallibereco de Zamenhof en pola karcero. Nun, aliu elpensis alion ; aŭdu :

La trovinto de Esperanto estas scienculo, filologo, kaj precipe multlingvulo, kiu sciis dek ok lingvojn. Lia nomo estas Zamenof, kaj li havis la profesion de kuracisto en Varsovio. Iam, li foriris el Varsovio por promenadi en balkanaj provincoj, kaj tie, li falis en landon kie oni parolis al li lingvajon, kies li ne komprenis eĉ unu vorton, li, la viro kiu konis dek ok lingvojn ! Li estis hontega, kaj, reirante hejme, li elpensis esperanton.

Kaj, aldiras la kronikisto de *La Famille* oni ne devas moki pri Esperanto !

Novaj Gazetoj

Kun plezuro ni salutas la naskiĝon de nia sveda kunfrato *Esperantisten*, kies redaktoro estas la malnova samideano A. AHLBERG, 37 Surbrunsgatan Stockholm, Svedujo.

Unua numero enhavas, post la Programo, interesan historion de l'Esperanto en Nordo. Literaturajo finas tiun numeron.

Sukceson kaj longan vivon ni deziras al nia neĝlanda kolego.

* * *

Ni havis la plezuron ricevi unuan numeron de *Centrameriko Esperantista*, bela revueto publikigata de S-ro P-ro F.R.G. ABRILL, en Guatemala.

Antaŭ kelka tempo S-ro Abrill ricevis de la Respubliko Guatemala oran medalon pro lia esperanta agado en Centra Ameriko.

S-ro Abrill, en sia revuo, evitas tre simple la malfacilon manko de sursignoj per apostrofo.

Tiu sistemo estas vere la plej konsilinda en simila okazo, precipe pri ĉefliteroj. 'Gin ni uzos laŭbezone.

Esperanta Ligilo, monato revuo en reliefpunktoj por Blinduloj. Jare fr. por ĉiu lando. Direktoro : P-ro Th. Cart, 12, rue Soufflot, Paris. — Januaro 1906, Enhavo : Kroniko (Th. C.). — Problemo. — Poezio : Birdetoj (Fr. Coppée) Humorajo : Pruvo. Decido. — Miksajo : proverboj (F. Zamenhof). Felietono : Parolado de S-ro Zamenhof en Boulogne-sur-Mer.

Unua Paŝo, n-ro 2, daŭras konigi al ni la bulgarajn vivon, moron, historion, deziron. Per tiu ĉi revueto, tute en Esperanto skribita, multaj foriĝos antaŭjuĝoj kaj malveraj kredoj pri la estiminda lando kiu ĝin eldonas. 'Ciu, kiu sin interesas pri la balkanaj demandoj, devus aboni ĝin.

Esperanta Espozicio en Angers

En urbo Anĝers, de majo ĝis oktobro, okazos granda espozicio. — Je tiu partoprenos la Esperantista Grupo de Anĝers. — Pro tio ĝi petas ĉiujn eldonistojn sendi kelkajn specimenojn de gazetoj kaj revuoj. La Grupo precipe dezirus komercajn prospektojn esperante presitajn de negocistoj francaj kaj fremdaj.

La anjua iniciativa sindikato, sidante kontraŭ la staciĝoma elirejo, ĉiujn informojn liveros al vojaĝantoj esperantistoj.

Federacio Esperantista Katalana

Post konsiliĝo inter la diversaj propagandistoj de Esperanto en tiu ĉi lando, estas decidite, pro la politika stato de l'aferoj, momente ĉesigi la laboradon de tiu societo. Fariĝis efektive malfacila kaj eĉ danĝera la propagando, kaj la organizado de la Federacio neniel ĝin preparis je batala rolo.

La hodiaŭa konto de la Fereracio havis deficiton fkoj : 271,95, ĉar la novjaraj kotizajoj ne povis esti enkasitaj regule. La komitato plenigis tiun deficiton per memvolaj pagoj, kaj haltigis la elspezojn. De nun, oni do ne volu sin turni al ĝi por io. Se iu deziros informojn aŭ helpon por propagando, oni povas sin turni ĉu al la societo *Espero kataluna* (Sinjoro Joan ROSALS, Portaferriça, 30, en Barcelono) ĉu al la *Sociedad Española para la propagacion del Esperanto.*

Kompreneble, en tiaj okazoj, la ĝenerala kunveno estas prokrastota ĝis pli oportuna momento.

* * *

Barcelona Revuo *Joventut*, sendas al ni serion da numeroj en kiuj ni legas kurson de Esperanto kaj longan nomaron de anoj kaj lernantoj. Brave al nia kolego !

Esperanto en Cambridge

La nombro de la konvertitoj al Esperanto en Cambridge nun kalkulas pli ol kvindek.

Neniuj faros pli grandan progreson ol la anoj de la loka polico.

Tio montriĝis ĉe la publikigo de l' rezulta-to de la « Cambridge Borough » elektado, kiam kolonelo Pollen havis interesan interparoladon en la internacia lingvo kun la dejora policano.

El *The Tribune*, 19 Januaro.

El Italujo

Ni ricevas la informojn sekvantajn. Jam de la 27. XII. 05 oni anoncis en la itala ĵurnalo *L'Avvenire d'Italia*, ke en Firenzo ĉe la *Instituto stenografico Toscano* kunvenis kelkaj amantoj de Esperanto por fondi grupon. Nun tio estas fakto. Estis fondita la 8.I.06 *Gruppo Esperantista Fiorentino*, kies prezidanto estas S-ro Rag T. BERNI-CAPACCI, kaj sekretario S-ro P-ro U. CICETTI-CARADEI. (Piazza. S. Croce 23)

Lecionoj de *Esperanto* komencis la Sabaton 20 jan. ĉe la societa sidejo de la Intituto Stenografia, kaj daŭros ĉiusabate (ĉe la 20-a horo).

Multaj gazetoj parolis lastatempe pri Esperanto. Ni precipe rimarkis en *Il Cittadino Italiano*, artikolo de nia fervora kunbatalanto I. Meazzini pri Esperanto en Anglatero.

ONI POVAS AĈETI LA GAZETON
ESPERANTO
en ĉiuj staciĝomoj francaj kaj svisaj

ESPERANTO KIEL PEDAGOGIA RIMEDO

Senpera konsekvenco de la logika perfekteco kaj de la sintaksa simpleco de l'esperanto estas tio ke la ekzercado per la traduko el nacia lingvo estas pli facila kaj pli profita en ĝi ol en ia ajn natura lingvo. Pli facila ĉar oni havas ĉiam nur dekses gramatikajn regulojn aplikotajn kaj la logikecon sekvotan ; pli profita, ĉar oni estas ĉiam certa, se oni laŭas la regulojn kaj se oni bone komprenas la tradukotan tekston, ke oni atingos rezultaton kontentigan kaj eĉ perfektan. Kiam kontraŭe oni tradukas francan tekston en latino aŭ anglo aŭ germano, oni povas obei ĉiujn regulojn de la gramatiko, kulpi nenian barbarismon kaj tamen fari ion kompatindan, ĉar kiam temas pri fremda lingvo, oni sukcesas preskaŭ neniam sin igi tute ensorbi la nedifineblajojn kiuj kuŝas en la bona uzado kaj spirito de la lingvo. En la esperanto la spirito de la lingvo estas la logikeco, ĉiam sama por ĉiuj homaj cerboj normale funkciantaj. La esperanto estas kvazaŭe la logikeco konkretigita kaj farita palpebla, kaj tio faras ĝin, por la tradukado, admirinda ilo precizeca.

De tiu ĉi vidopunkto ankaŭ, mi rigardas la esperanton kiel admirindan materialon por la unuagrada instruado, taŭga por altigi la nivelon de tiu ĉi instruado kaj fari ĝin la egalulo de la duagrada. En kio konsistas, laŭ lasta analizo, la diferenco neneigebla kvankam kontestita, inter la spirito unuagradula kaj la spirito duagradula ? Sajnas al mi ke tio konsistas en tio ke la duagrada instruado havas ian superecon de kritika senco, konsekvence de la studado pli longa kaj pli penetra de la fremdaj lingvoj kaj precipe de la antikvaj. Studante fremdan lingvon, infano estas senĉese devigata fari, konscie aŭ nekonscie, la kritikon de la vortoj, unue de tiuj de sia nacia lingvo, poste de tiuj de la studata lingvo. Kaj la kritiko de vortoj, kiu estas la sola rilate atingebla de infano, estas la plej bona preparado al la kritiko de la ideoj, necesega por la plenaĝa homo kaj por la regnano.

Estas proksimume neebla, almenaŭ provizore kaj pro ĉiuspecaj kaŭzoj enkonduki en la unuagradajn lernejojn la instruadon de la fremdaj lingvoj ; sed oni povus, sen tro granda malfacilo, tien enkonduki artefaritan lingvon, tiel perfektan kaj tiel facilan kiel esperanto, kiu liveras, en la vidopunkto pedagogia, ĉiujn profitojn de natura lingvo sen ĝiaj malprofitoj.

La esperanto estus la latino de la demokratioj.

Tradukita el S-ro MUFFANG.

PRI MAROKO

Tre estimata Sinjoro,

En Alĝera ĵurnalo ni ĵus legis ke oni parolas inter politikistoj pri introduko de ia neŭtra lingvo en Maroko.

Kian belan okazon ni havas nun klopodi por Esperanto !

Alĝera Grupo havas la honoron prezenti al la Centra Propaganda Komitato jenajn tri proponojn :

1-e ĉiuj eŭropaj grupoj tuj skribu esperante aŭ nacilingve al la riprezentanto de sia patrujo ĉe la Algesiras'a internacia kunveno, petegante lin ke li bonvolu atenti kelkajn horojn pri la Zamenhof'a lingvo, kaj pripensi pri la ebleco de ĝia introduko en la organizotan internacian Administracion en tiu lando.

2-e ĉiuj libroj plej taŭgaj por faciligi al ĉiu naciulo la lernadon de esperanto estu sendataj al la riprezentanto de tiu nacio en la Kongreso.

3-e ĉiu sindonema esperantisto en la mondo skribu al la delegito de sia nacio, ĉu esperante ĉu nacilingve (plej bone en ambaŭ idiomoj), petante lin unue pripensi, poste klopodi por esperanto.

'Sajnas al ni ke estas dezirindege ke la Centra Komitato agu sen neŭtili nur unu solan muniton.

La alĝera Grupo komencas sendi al Alĝesiras'o la ĉefeĉajn vortaretojn, kaj skribas hodiaŭ mem al S-ro REVOIL, iama ĝenerala Guberniestro de Alĝerujo : ni konsilas al ĉiuj niaj alĝeraj anoj tuj skribi al la diversaj francaj kongresanoj.

Esperante ke vi akceptos nian proponon, ni havas la honoron sendi al vi, estimata Sinjoro, niajn plej korajn salutojn.

Por la Alĝera Grupo : *La Prezidanto*,
Maurice AUBERT.

Alvoko por la rajtoj de la Nacioj

Malgraŭ la kreskanta pligrandiĝo de la ideoj de justeco kaj de paco inter la popoloj, doloriga afero, kiu povas esti kaŭzo je neantaŭvideblaj katastrofoj, ankoraŭ restas ne solvita.

En la epoko, kiam la sankta rajto de ĉiu nacio havi la aŭtonomion kaj la sendependecon, estis nerekonata, ŝtatoj, per forto, enkorpigis naciajn grupojn, kiuj tiamaniere troviĝas nun submetataj sub fremda registaro.

Izolataj la unuj de la aliaj, sen iu ligilo defenda, kiu unuigas ilin kontraŭ iliaj malamikoj komunaj kaj kiu defendas iliajn rajtojn je la sendependeco nacia, la subpremataj nacioj suferadis ĉiujn la eblajn turmentojn.

Estas necese, ke de nun ĉiuj tiuj nacioj pli proksimiĝu en iliaj komunaj esperoj, ke ili unuiĝu iliajn penadojn, kune kun la penoj de ĉiuj la animoj justaj kaj senartifikaj, el kie ajn ili venas. Per tiu unuiĝo, la rajtaj petegoj de la dependaj nacioj estos fine aŭditaj kaj komprenitaj de la subpremantoj. Tiam nur, la rilatoj internaciaj ne plu estos fonditaj sur la « statu quo » maljusta, sed sur la sola ebla fundamento por la ĉiama paco, sur la « Principo de la nacioj ».

Vastega Unuiĝo ĵus fondiĝis, kiu celas unuigi anojn de ĉiuj la subpremataj nacioj : Poloj, Irlandanoj, Alsaco-Lorenanoj, Katalanoj, Armenianoj, Litvanoj, Finlandanoj, Bohemoj, k.t.p., kaj ankaŭ ĉiuj ajn personoj, kiuj deziras kunbatali por la sama ideo.

Tiu Unuiĝo nomiĝas : « Unuiĝo por la rajtoj de la nacioj ». Alvoko, france redaktata, estas jam presita. 'Gi estos sendata al ĉiu persono, kiu ĝin petos de la « Secrétariat de l'Alliance pour les droits des nations ; 13, Bld. des Philosophes, Genève (Suisse) ».

La lingvo Esperanto ludos tre gravan rolon por la anoj de la malgrandaj nacioj, kies lingvoj estas malmulte disvastigataj ; oni do povas esperi, ke Esperanto tre bone taŭgos kiel internacia komprenilo por tiu nova kaj gravega « Unuiĝo ».

ATENTINDA MALFELIĈO

Ni ricevas la jenan leteron :

Budapesto 29/1/06.

Estimata Sinjoro !

Per tiu ĉi mi havas la honoron sin turni al vi kun grandega peto.

La teruraj malordoj kaj bataladoj en Rusujo malpermesis al mi tie pli resti por vivi, ĉar la ĥuliĥanoj disrabis, disŝtelis, disrompis la tutan mian havon. Mi havis en Rusujo riĉan komercan magazenon, sed tiu ĉi mia aventuro devigis min forlasi kaj forkuri el Rusujo kun mia familio (edzino kaj kvar infanoj).

La malgranda kapitaleto, kiun pruntis al mi mia kara amiko S-ro D-ro ROSENBERG, nia varmega esperantisto, permesis al mi veni nur Budapeston, ne plu.

Sed, veninte Hungarujon, mi eksentis, ke la lando, popolo kaj la lingvo tute fremda por mi estas ; ĉirkaŭ 3 semajnoj mi kun mia familio sin trovis en la plej terura situacio. Fine mi sin turnis letere al unu el Budapestaj propagandistoj, varmega esperantisto S-ro J. MILETZ.

Sekve de tio, kelkaj esperantistoj vizitis min ; kaj ĝis nun mi ricevas de ili subtenadon por ne morti pro malsato.

Sed, por mia ekzistado en la estonteco, mi bezonas : aŭ forveturi en alian landon, kie mi pli malpli komprenu la popolon (ekz. Galicio) aŭ aranĝi en Budapesto mem ian aferon pro kiu estas bezone kelke da mono.

Mi pensas, ke vi eble povos per ia maniero ion fari por mi kun la helpo de la aliaj amikoj esperantistaj.

Antaŭe ni sendas al vi nian koran familian dankon.

A. M.

Kiel ni jam diris, internacieco kreas moralajn devojn kiujn estas neeble rifuzi. Tial ni estas certaj, ke niaj legantoj ne ŝancelos sendi kelkan helpon al tiu malfeliĉa familio, forjetita el sia lando per la teruraj politikaj tertremoj. Oni povas sin turni al nia hungara kolego revuo *Esperanto*, Hungar-Aŭstrujo, Budapest IV, Papnövelde — u 6. S-ro Aŭgusto de MARIĈ.

LINGVAJ KLARIGOJ

de Dro ZAMENHOF

Vortfarado

La vorto « bezonesti » estas kunmetita tute regule, kaj vi povas ĝin uzadi. Sed entute ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al tiu ĉi lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj ; sed en nia lingvo la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj se ili estas ne kunligataj, sed uzataj aparte.

Esperantisto, marto 1891.

* * *

Ni uzas ordinare la formon « konatiĝi » (= fariĝi konato kun iu), sed ankaŭ la formo « koniĝi » estas tute bona (= fari sin koni ion).

Esperantisto, januaro 1891.

Rem. Pri tio ni aldonas ke la radikoj verbaj *aktivaj* post almeto de sufiksoj *igi, iĝi* havas plejofte duoblan sencon kiun nur la frazo povas klarigi. Tiel sci-igi signifas tiel bone :
Igi scianta (iun) t.e. *informi, instrui* kiel :
Igi sciata (ion) t.e. *anonci.*
Tute same, sci-iĝi estas trovata kun la ambaŭ signifoj :
Fariĝi scianta kaj fariĝi sciata.
Tamen la pli ofta uzo estas en la dua senco. Cetere, kiam okazos dubo, oni uzos la elkliganformon : vi konatigis min de li, vi konantigis min pri li, kc.

NOTO DE LA RED.

* * *

Uzado de prepozicioj

Per si mem ĉiu prepozicio en nia lingvo havas nur unu signifon. Se vi en la vortaro havas diversajn prepoziciojn kun *kelkaj* tradukoj, ĝi venas de tio, ke la vortoj de unu lingvo neniam povas esti tute paralelaj al la vortoj de alia lingvo kaj esti precize tradukeblaj per unu vorto.

Doni klarajn respondojn je ĉiuj tiuj ĉi demandoj estus neeble eĉ en la plej vasta gramatiko ; nur multaj ekzercoj povas tie ĉi helpi, kaj tial vi faros la plej bone, se al ĉiu, kiu volas bone koni la stilon de nia lingvo, vi konsilos multe legi.

Esperantisto, aprilo 1892.

EKZERÇOJ

SALONAJ BABILOJ

(Daŭro)

H. — Kia estas vetero ?
L. — La vetero iĝas bela ; ni havos belan tagon.
H. — Tiom pli bone, car hieraŭ la vetero estis nefiksa kaj ŝanĝema.
L. — Mi tion tre rimarkis : mi estis surprizita de pluvego kaj malsekigita ĝis la ostoj.
H. — Vi do ne havis nek pluvombrelon nek surtuton ?
L. — La ĉielo estis tiel bela, ke mi neniel antaŭgardis min kiam mi eliris.
H. — Jes, sed la vetero estis peza, la varmo premega, kaj vidiĝis (= se faisaient voir) en la ĉielo kelkaj el tiuj nubetoj kuprokoloraj kiuj anoncas fulmotondron.
L. — Mi kredis ke ili disiĝos.
H. — Vi kalkulis sen la mastro.
L. — Ve ! jes. Subite ekventis ; la ĉielo kovriĝis per nubegoj kaj perforta (= violente) pluvo kun hajlo miksita defalis sur min.
H. — Kompatindulo ! Kaj kie vi estis en tiu momento ?
L. — Je du kilometroj de la urbo, tute en la kamparo.
H. — Vi ne do povis meti vin sub ŝirmon ?
L. — Neeble. Ekzistis vere kelkaj juglandujoj en la kampoj, sed vi scias kiel danĝere estas rifuĝi sub arbon dum la fulmotondro.
H. — Tial vi ricevis la tutan pluvegon.
L. — Nature. Aldonu al tio ke la fulmoj kaj la tondrobatoj sekvis unu la alian senĉese kaj ke la vento forblovis (= emporta en soufflant) mian ĉapelon.
H. — Unu malfeliĉo okazas neniam sola.
L. — Mi ĝin postkuris kaj havis la feliĉon haltigi ĝin metante sur ĝin mian piedon.
H — Bonega rimedo por doni originalan formon al sia ĉapelo !
L. — Vi ridas ; sed mi ne ridis. Mi havis ŝajnon de ŝtelisto, miaj ŝuoj ne plu aliĝis al miaj piedoj, mia pantalono estis kota ĝis la genuoj kaj mia ĉapelo fariĝis defluilo.
H. — Vi devis esti belvida.
L. — Tio ne estas ĉio.
H. — Ankoraŭ unu malagrabla aventuro ?
L. — Mi devis returni hejmen.
H. — Nature.
L. — Kaj estis neeble trovi veturilon.
H. — Estas imageble (imagi = imaginer).
L. — Subite la fulmotondro ĉesas kvazaŭ per sorĉo.
H. — Agrable !
L. — La nuboj disiĝas, la suno reaperas, la akvoj forfluas aŭ vaporiĝas.
H. — Jen vi estis savita.
L. — Vi kredas tion ? Elerariĝu (= devenez hors d'erreur). Apenaŭ la fulmotondro pasis, kiam multo da promenantoj eliris el la urbo kaj sin disvastigis tra la kamparo.
H. — Nenio estas pli agrable ol promeni post fulmotondro.
L. — Jes ; sed nenio estas pli malagrabla ol esti vidata de siaj amikoj kaj konituloj kiam oni havas la ŝajnon kiun mi havis.
H — Sed ankoraŭ unufoje, kial vi ne kunportis pluvombrelon ?
L. — Mi ne embarasas min nek per pluvombrelo nek per sunombrelo ; mi ne volas havi la ŝajnon nek de vilaĝa lernejmastro nek de maljuna pensionita oficisto.
H. — 'Cu vi almenaŭ kunportos malpezan surtuton someran sur brako, se vi eliros baldaŭ ?
L. — Ne ; tio tro ĝenas.
H. — Definitive vi estas neinstruebla.
L. — Permesu al mi foriri, sinjorino.
H. — Vi volas jam lasi min ?
L. — Volu kedi ke mi tre malĝojas ke mi ne povas resti pli longatempe apud vi.
H. — Egale mi bedaŭras ke via vizito tiel malmulte daŭris (= dura si peu).

Esperanto-ĵurnalo.

POSTULU ! POSTULU ! POSTULU !
*** ESPERANTO ***
en ĉiuj librejoj kaj ĵurnalejoj.

AMUZAĴO

Foje mi eniris en la butikon de panisto kaj diris :

« Bonan al vi tagon, Sinjoro, ĉu vi havas malfreŝan panon ? »

— « Ho, jes », li respondis, « amiko mia ».
— « Nu ! » mi aldiris forirante, « estis necese ĝin vendi, kiam ĝi estis freŝa ! »

Maurice PERRIAUX.

POR PROPAGANDO

Ni havas kelkajn nevenditajn numerojn resenditajn de la vendistoj kaj tenejistoj. Tiuj ekzempleroj estas ne tre freŝaj, iom flaviĝintaj aŭ makulataj, sed ankoraŭ tre taŭgaj por propagandaj celoj. kiel senpaga disdono, intenca perdo en legejoj, vagonoj, atendaj salonoj, por la hospitaloj kaj por ĉio kion povas eltrovi penso de lerta propagandisto. Ni povas ilin liveri *afrankite ĉe domo* por la jenaj prezoj :

POSTPAKETO DA :	DUA ELEKTO	UNUA ELEKTO
3 milgramoj (ĉirkaŭ 150 ĵurnaloj.)	2 50	4 » »
5 milgramoj (ĉirkaŭ 250 ĵurnaloj.)	3 70	6 20
10 milgramoj (ĉirkaŭ 500 ĵurnaloj.)	6 50	11 50

Supera elekto : tute freŝaj ekzempleroj. Unu cento : 4 fk., poŝto plie.

AVIZO AL ABONANTOJ

Se oni ne esprimas malan deziron, ni komenciĝas la novajn abonojn de unu el la lastaj numeroj. De kelkaj restas al ni nur tre malmulte da ekzemplerojn. Ni povas ilin liveri je la jenaj prezoj :

N-roj 2, 7, 8 k. 9 ĉiu 0.30
N-roj 3, 6, 10 k. 15 ĉiu 0.20

La 15 unuaj n-roj, afrankite 2 fr. 50

N-ron 1 ni ne vendas aparte de la kolekto 1905.

Komerca vojaĝisto pri paperajoj aŭ similajoj, partiano de Esperanto estas petata sin konigi al administranto de tiu gazeto, informante pri la lokojn kiujn li trairas dum siaj vojaĝoj.

ELIROS LA UNUAN DE MAJO

SOCIA REVUO

tute redaktata en Esperanto, pri ĉio kio rilatas al la progresoj de l' homara vivado kaj organizado.

Fakoj : Filozofio. — Religio. — Juro. — Mutualismo. — Politiko. — Tradukajoj.

Krom la fako *Tradukajoj*, ĉiuj artikoloj estas originalaj.

Unu numero **1** franko afrank.

Gravaj rabatoj po multe.

NOTU BONE :

Estos presataj *nur la antaŭ menditaj* numeroj — nenia estos vendebla post la eliro.

La cent unuaj mendantoj ricevos plie la duan volumon senpage.

Sin turni al *Esperanto*. Céret. 4. P.-O. France.

CANADA
ni bezonas seriozajn makleristojn por nia gazeto en francalingva
KANADO

DEZIRAS KORESPONDI

F-no Anna FARRÉ, kun juna anglino.
F-no Johanino BERTHOLLE, kun dano, svedo aŭ norvego.
F-no Anna MIQUEL, lernejestrino, kun rusa instruistino, pri sociaj kaj instruaj temoj.
Komuna adreso : CÉRET, P.-O. France.

GRANDAJN VINOJN KAJ ORDINARAJN, KIUJN LI RIKOLTIS
Dro A. VESOUX, en Beaune (C.-d'O).
Proponas po moderaj prezoj. 12-7.

CAVE COOPÉRATIVE DE L'ABBAYE ST-MICHEL
à GAILLAC-SUR-TARN.
Renaskiĝo de unu el la plej antikvaj kaj famaj vinspecoj de Francolando.
GRAND VIN DU COQ
ŝaumanta vino blanka (fabrika marko registrita).
Vinoj blankaj, dolĉaj kaj *nedolĉaj.*
(Oraj medaloj) — Moderaj prezoj.
Agemaj reprezentantoj estas petataj.
Sin turni al S-ro Elie BERTRAND, direktoro, en GAILLAC-SUR-TARN (France).

TRA LA MONDO
Tutmonda multilustrata Esperanta revuo
Kunlaborado plene internacia pri la sekvantaj temoj : nuntempajoj, arto kaj literaturo, sciencoj, komerco, industrio, militistaro, maristaro, teatro, sportoj, virina kaj gejunula paĝo, felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj.
Eliras je la fino de ĉiu monato
Jarabono, nur 8 fr. ; kvaronjara, 2 fr. 25 c., poŝtmandate. — Unu specimeno : 0 fr. 75 c., poŝtmarke.
15, Boulevard des Deux-Gares, MEUDON (Seine-et-Oise), France.

ESPERO PACIFISTA
Monato organo de l'Internacia Societo Esperantista por la Paco.
Jara abonkosto. 5 fkoj. minimuma kotizo Krom avizo kontraŭa, la abonantoj estas enskribataj kiel aliĝantoj al la Societo. Tiu ĉi akceptas opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

THE BRITISH ESPERANTIST
Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novajoj, k.c. anglo-esperante, kaj 8 paĝoj da aldono tute en Esperanto.
Jare 4 fk. (sen aldono 2 fk).
Oni abonas ĉe la Sekretario de la B.E.A., 14, Arundel Street, Strand, London, aŭ ĉe *Esperanto.*

GERMANA ESPERANTISTO
Monata organo de germanlingvaj grupoj, redaktata esperante kaj germane.
Enhavo propaganda, kronika, literatura.
Abonprezo por ĉiuj landoj Mk. 3 —, fr. 3.75, sh. 3 —.
Admin. kaj Red. : *Berlino*, Prinzenstr. 95.
Abonmendoj kaj pagoj estas akceptataj de la administranto de *Esperanto.*

RUSLANDA ESPERANTISTO
Ĉiumonata ĵurnalo Esperanto-rusa de la Societo « Espero ».
Vasta kaj diversa materialo pri la problemo kaj movado de Esperanto. Social-politika fako. Verkoj de gloraj modernaj beletristoj (*Ruĝa Rido* de L. ANDREJEV k.al.)
Detalaj prospektoj estas riceveblaj senpage.
Jara abonpago (kune kun membriĝo en la Sto *Espero*). — *3 rubloj* (7 fr. 50).
Adreso : Ruslando *St-Peterburgo*, B. Podjaĉeskaja, 24, la Sto « Espero » — aŭ al administranto de *Esperanto*, Céret 4 P.-O. France.

RONDIRANTO
bele ilustrita esperanto-bulgara ĵurnalo.
Estas rezervitaj nur kelke da jarkolektoj, kiuj estas vendeblaj : de l'unua jark, plena 10 fr., I-a jark, sen n-roj 1, 2, 5 fr., II-a jark, plena 4 fr. III-a jark, nur 6 n-roj 3 fr.
Aĉetataj tutaj tri kolektoj 15 fr.
Tolbinditaj ambaŭ kolektoj 17 fr.
Aĉeteblaj ĉe S-ro G. P. OREŜKOV, sekretario de l'klubo « Stelo » en *Plovdiv*, Bulgarujo.

LA SIGNO ESPERANTISTA
estas
LA VERDA STELO GASSE
★
prezo 1 franko.
Specialaj rabatoj pogrande. Sin turni al Esperanto. Almeti 0 fr. 15 por afranka sendo rekomendite.

LIBREJO L. LAMIOT
CÉRET — (P.-O.) — Franco
Fonetiko Litera, de M. VEREMA *(elvendita)*. 0 50
Provo de ĥemia nomaro de P. BERTHELOT. 0 50
Tiuj 2 verkoj estas presitaj *sen sursignoj.*

ŜTOPILOJ EL KORKO
J. TRESCASES
CÉRET (P.-O.) Franco.

SECONDE ANNÉE. — N° 18. Le Numéro : 10 CENTIMES. DIMANCHE 11 FÉVRIER 1906.

★ ESPERANTO ★

JOURNAL DE PROPAGANDE POUR LA LANGUE AUXILIAIRE INTERNATIONALE

DE L. L. ZAMENHOF

ADMINISTRATION :
M. Paul BERTHELOT
CERET (Pyr.-Or.) France.

ABONNEMENTS
24 numéros consécutifs, 3 fr. pour le monde entier.
10 abonnements à la même adresse : 24 fr.
Édition de luxe : 12 numéros, 4 fr.

RÉDACTION :
M. Ch. LAMBERT
10, rue Berbisey, DIJON (Côte-d'Or).
N'envoyer à la Rédaction rien de relatif à l'Administration.

PUBLICITÉ-ANNONCES
Agent Général : M. EMILE GASSE
59, Phalsbourg, LE HAVRE (Seine-Inférieure).
Prix des annonces côté français :
Le centimètre-colonne : 2 francs.
Réduction 25 0/0 pour 12 insertions ; 33 0/0 pour 24.
Minimum : 5 francs.

Le numéro **19** *de* **Esperanto** *paraîtra DIMANCHE 25 FÉVRIER*

Avec menaces de poursuites judiciaires, M. de Beaufront exige l'insertion intégrale de la lettre ci-dessous.

Quoique, à mon avis, plus d'une phrase y outrepasse les droits *juridiques* de la réponse, je ne vois aucun inconvénient à l'insérer dans son entier.

Etant donné l'article de M. Moch qui a paru dans le précédent numéro, j'aurais pourtant préféré que M. de Beaufront fît tout simplement un plaidoyer en faveur de S.f.p.E., comme je le lui ai proposé, en lui en indiquant les motifs.

CH. LAMBERT.

Paris, le 3 janvier 1906.

Mon cher confrère,

Je viens vous demander de vouloir bien faire bon accueil aux rectifications de cette lettre et qui sont occasionnées par l'article de tête paru dans l'*Esperanto* du dimanche 31 décembre 1905.

L'histoire exigeant une entière exactitude, je suis sûr que votre courtoisie se fera un plaisir de m'aider, par cette insertion *dans votre prochain numéro*, à lui rendre ce caractère pour les points que je vise. Je désirerais que cette lettre occupât la place de l'article qui la nécessite.

C'est en 1888, et non en 1890, que j'ai adhéré à l'Esperanto, comme en pourraient témoigner le Dr Zamenhof et ma correspondance qui est là pour le prouver. D'ailleurs mon nom figure dans le recueil des premiers Espérantistes paru dès janvier 1890, ce qui suppose une adhésion antérieure.

M. Demonget a bien, en effet, traduit la brochure « *Internacia ou Volapük ?* », dont le texte est de notre cher Léopold Einstein, ceci en 1889 ; mais je n'ai pas eu le bonheur de le trouver aux côtés de MM. René Lemaire, Gaston Moch, le général Sebert et Henri Hamel, qui furent jusqu'à l'année 1898 à peu près mes seuls soutiens, sans oublier toutefois, à partir de 1896, l'appui de l'*Etranger*, devenu depuis la revue *Concordia*. Le premier en date (août 1892), M. René Lemaire nous a tous aidés pendant dix ans, jusqu'à la ruine de sa santé, et dans des conditions de dévouement *admirable*. Aussi ai-je lieu de m'étonner que son nom ne soit même pas rappelé. Pourtant, en l'unissant au mien dans l'expression de sa reconnaissance, la réunion des Français, au Congrès de Boulogne, avait assez rappelé cette coopération pour qu'elle ne fût pas une fois de plus oubliée. Le silence pratiqué sur de tels dévouements ne peut certes nous grandir aux yeux de tous ceux qui savent.

